Studosemajnfino post trudizoliĝo

Dum preskaŭ du jaroj paŭzis la studosemajnfinoj de Esperanto Nederland. Ni organizantoj forte sentis ilian mankon!

Sed nun vi denove povas aliĝi al tia semajnfino, kiu estas planita je la 19-a ĝis 21-a de novembro 2021, denove en la Nivon-domo Krikkenhaar apud Almelo. Kaj ni firme esperas ke ĉi-foje ĝi ja povos okazi. La pandemia evoluado en Nederlando kaj la lastaj mesaĝoj de la registaro estas kuraĝigaj.

Prefereble ĝi estos studosemajnfino kian ni kutimas travivi: kun domo plena de Esperanto-studantoj, lecionoj je kvin diversaj niveloj, bonaj manĝoj kaj multe da bonetosa kunestado.

Sed ĉu eblos precize tiel, tio restas iom necerta. Ĉu ni ankoraŭ devos observi distancon? Ĉu vizaĝmaskoj ankoraŭ estos parto de la normala ekipaĵo? Ĉu ni devos submetiĝi antaŭe al rapidtesto aŭ kunporti vakcinatestilon? Espereble ne, sed ni vidos.

Ĉiuokaze ni volas instigi ĉiujn interesiĝantojn ke ili nepre aliĝu! Ni estas optimismaj kaj supozas ke eblos revidiĝo en Krikkenhaar en novembro. Sed se la afero tamen disvolviĝos alie, aŭ se ankoraŭ/denove validos restriktoj kiuj igos vin nuligi vian aliĝon, vi rericevos la plenan sumon de via antaŭpago.

Ĝis revido en Krikkenhaar!

Ineke, Lilian en Arjen-Sjoerd